Protokolo de la 2-a Prezidikunsido de UkrEA

La 1-an de aprilo, Odeso.

Partoprenis: E. Kovtonjuk, I. Glagolevskij, distance O.Rohalskij, N. Vološin
Ankaŭ: S. Vajnblat, T.Popova, G. Balaur

Tagordo:

1. Memore al Volodimir PACJURKO

E. Kovtonjuk informis pri vizito kune kun V.Voroblevskij al la familio de Pacjurko en urbeto Pustomyty post la 9-a tago de lia morto. De nomo de UkrEA Eŭheno elpašis dum la funebra procedo.
Konsiderante memproponojn de ges-oj N.Daniljuk, M.Lineckij, E. Kovtonjuk kaj V.Pajuk finarangi la lastajn kvar leterojn mankintaj en la Granda UE vortaro de V.Pacjurko, peti (komisii) al N. Daniluk ordigi tiun laboron. Ŝi estas la plej sperta en kompiloj de vortaroj.
Estis akceptita unuanime.

2. Pri la 30-jarigo de UkrEA.

Laŭ la decido de la 24-a kongreso de UkrEA E. Kovtonjuk februare esploris eblecon organizi la celebradon en Poltavo. Post kontaktoj al V.Soroka kaj kelkaj poltavaj esperantistoj evidentigis ke tio ne eblas.
La plej taŭga kaj serioza formo celebri la jubileon estas la scienc-praktika konferenco en Nacia biblioteko de Ukrainio nome de Ja. Mudryj (Kijivo, strato de Miĥajlo Hruŝevskij, 1.) La konsenton jam estas ricevita. La informo estis sendita al HELIANTO.
Estis proponite komisii al E. Kovtonjuk daurigi la preparon al la konferenco. Necesas kompili la programon, trakti kun dezirantoj temojn de la prelegoj kaj fintrakti kun la respondeculoj en la biblioteko organizajn kaj teknikajn detalojn, trovi eblecon ekspozicii en la konferencejo E-literaturon.
Aldone E. Kovtonjuk proponis sekvi la ekzemplon de forlasinta la landon s-ro M.Lineckij, transdoni la parton de E- libraro al la biblioteko por la plej amasa uzo.
Ĉio estis aprobita unuanime.